

Principoj kaj praktiko en la Esperanto-komunumo

Mark Fettes

Universala Esperanto-Asocio

Esperanto baziĝas sur jena universaleca koncepto: ke ĉiu homo havu la elekton kaj realan eblecon komuniki, kiam ajn necese, en lingvo plene regata kaj sentata kiel propra.

En la bildo, kiun ni heredis de la Romantikismo, ĉiu homo ĝuas tiun rajton jam denaske en la hejmo kaj en la hejmgregiono, la hejmo. En same ideala bildo, la ŝtata edukistemo zorgas pri la provizo de komuna socia lingvo, konvena por ĉiuj enlandaj aferoj, ekde la infanaĝo. Kaj do estas facile konstrui idealan bildon pri la rolo de Esperanto kiel tria ŝtupo en tiu turo de identecoj, lingvo komune homa por ĉiuj nacioj.

Sed, kiel jam tre klare konsciis Zamenhof, tiu ideala, romantika bildo estas verdire nur propagandaĵo, plibeligo de multe pli kruda realo, en kiu milionoj da homoj suferas pro la neegaleco de la lingvoj. Kiel li diris en la Unua Libro: “Renkontiĝante kun homoj, ni ne demandas, kiajn politikajn konvinkojn ili havas, sur kiu parto de la terglobo ili naskiĝis, kie loĝis iliaj prapatroj antaŭ kelke da miljaroj: sed tiuj ĉi homoj ekparolas, kaj ĉiu sono de la parolo memorigas nin, ke ili estas fremdaj por ni. Kiu unu fojon loĝis en urbo, en kiu loĝas homoj de diversaj reciproke batalantaj nacioj, tiu eksentis sendube, kian grandegan utilon alportus al la homaro lingvo internacia, kiu, ne entrudi-ĝante en la doman vivon de la popoloj, povus, almenaŭ en landoj kun diverslingva loĝantaro, esti lingvo regna kaj societa.”

Tio montras, ke Zamenhof ne volis limigi la rolon de Esperanto al uzado inter ŝtatoj: en moderna lingvaĵo, li konceptis la lingvan egalecon kiel vere universalan rajton, validan ĉie kaj ĉiam. Esperanto estis ilo, instrumento, por ebligi la plenumon de tiu rajto. Sed jen la ĉefa demando, kiun provos respondi mia hodiaŭa kontribuo: se Esperanto, pro diversaj kialoj, ne trovas ĝeneralan akcepton en la socio, sed nur ĉe iu parto de la loĝantaro, kio okazas al la celo de lingva egaleco? Ĉu ĝi restas nur fora revo? Aŭ ĉu eblas ĝin realigi, parte aŭ tute, en eta modela societo?

Mi substrekas, ke mia demando ĉi tie ne estas unuavice teoria, pri la dezirindeco de Esperanto aŭ de lingva egaleco, sed etnologia, pri la efektiva socia funkciado de la lingvo kaj la principo. Mi klopodos montri, ke ankaŭ esperantistoj spertas la breĉon inter principoj kaj praktiko, kiun sino de Saint-Robert jam klare priskribis en la kadro de Unuiĝintaj Nacioj; sed ke pluraj tendencoj en la komunuma praktiko klarigeblas kiel senkonsciaj klopodoj redukti tiun breĉon ĝis minimumo.

La principo de lingva egaleco

Ni komencu per iom pli atenta ekzamenado de la koncepto de lingva egaleco. Jen simpla, facila vortumo, kiu kaŝas terure komplikan fenomenon. Ekzemple, la politikologo Jonathan Pool (1987), analizante la literaturon pri lingva diskriminacio, identigis kvin tipojn de lingva malegaleco:

1. malegaleco laŭ privilegioj ĝuataj de la uzantoj de diversaj lingvoj;
2. malegaleco laŭ la uzterenoj kaj kapabloj de diversaj lingvoj;
3. malegaleco laŭ parollerteco ene de difinita lingvo;
4. malegaleco laŭ la lingvaj rimedoj disponeblaj por paroli pri difinitaj temoj;
5. malegaleco akompananta diversajn lingvojn (ekzemple la malriĉeco de difinitaj lingvokomunumoj kompare kun aliaj).

Esperanto implice proponas solvon al ĉiuj kvin tipoj de lingva egaleco, almenaŭ laŭ la utopia

vizio de socio, en kiu ĉiu homo regus ĝin perfekte. Sed en nia nuna malperfekta mondo, kiel ĝi funkcias en la praktiko?

Egaleco laŭ privilegioj

Unue, la problemon pri malegalaj privilegioj la esperantistoj solvis per tio, ke inter ili Esperanto havas prioritaton super ĉiuj aliaj lingvoj. Tio nepre validas por la Universalaj Kongresoj, sed ofte eĉ en naciaj kongresoj, en klubkunvenoj, kaj eĉ inter individuaj esperantistoj el la sama lando. Fakte eblas neniu alia solvo. Allasi aliajn lingvojn – ekzemple decidi, ke Esperanton oni parolas nur, kiam oni ne havas alian komunan lingvon – ĉiam riskas starigi skalon de lingvoj; ĝi malfermas pordon al la ekonomia kaj kultura premo de imperiaj aŭ hegemoniaj lingvoj. La lingvoj fariĝas egalaj, nur se Esperanto regas super ĉiuj.

Nu, en nia malperfekta mondo, eĉ esperantistoj devas foje cedi kaj allasi aliajn lingvojn, ekzemple kiam ni aranĝas simpoziojn pri lingvopolitiko! Kaj jen dua tre forta principo: por gardi la principon de egaleco, nur denaskaj (aŭ eventuale duaj, sed naciaj) lingvoj estas plenrajtaj kaj samrajtaj. Tio signifas, ke estas en ordo, se anglalingvano parolas la anglan, aŭ franclingvano la francan; sed se franclingvano parolas la anglan en esperantista kunveno, tio impresas kiel ŝoko. Ni ja povas konsideri iom escepta la paroladon de s-ro Poth en la Solena Inaŭguro, ĉar li ja legis mesaĝon verkitan en la angla, kaj enkondukis ĝin per kelkaj franclingvaj frazoj; sed se li mem propravole elektus la anglan, tion oni sentus kiel gravan atencon kontraŭ la regantaj normoj.

Plia neantaŭvidebla, sed fakte tute konsekvenca kaj logika evoluo, estas la revalorigo de la denaskaj lingvoj inter esperantistoj. Inter multaj neesperantistoj regas la supozo, ke homoj interesitaj pri mondlingvo ne taksas gravaj la lokajn lingvojn; kaj tio, mi suspektas, efektive validas por multaj disvastigantoj de la angla, ekzemple. Sed fakte ĉe la esperantistoj pli kaj pli fortiĝas la konvinko, ke unu el la plej gravaj celoj de la movado estas krei respekton kaj subtenon al ĉiuj lingvoj. Mi donos etan ekzemplon pri tio, kiel tio praktike funkcias. Antaŭ kelkaj jaroj, Esperanton eklernis juna malajzia ĉinino; ŝi poste vojaĝis al Pollando kaj pasigis iom da tempo inter la movadanoj ĉi tie. En sia artikolo pri tiu sperto en la revuo *Esperanto*, ŝi komentis: “unufoje mi ekkonsciis, ke mi ne scias legi kaj skribi en mia propra lingvo, la ĉina, ĉar en la lernejo oni instruis al mi nur la malajzian. Nun, pro Esperanto, mi eksentis deziron pli bone koni mian denaskan lingvon.”

Egaleco inter malegalaj lingvoj

Se la esperantistoj, do, trovas sin batalantoj ne nur por lingva demokratio, sed ankaŭ por lingva diverseco, tio nature kondukas ilin sur la terenon de lingvaj rajtoj. Apenaŭ okazas kongreso, en kiu ne diskutiĝas iu aspekto de lingvaj rajtoj lige kun la kongresa temo: ĉu la rajto je edukado en la denaska lingvo, ĉu la rajto uzi sian lingvon publike, por kulturaj kaj politikaj celoj, ktp. Je pli profunda nivelo, nepras mencii la esplorojn de Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, kiu de pli ol dudek jaroj pacience dokumentas kaj la diversecon de la lingvoj kaj la multflankan lezadon de la lingvaj rajtoj en diversaj landoj tra la mondo. En ambaŭ kazoj oni rimarkas la memfidon de komunumo, kie la potenc-malegaleco inter la etnaj lingvoj jam ne ludas rolon.

Unu el la fundamentoj de la lingvaj rajtoj estas *lingva respekto*, kaj tion la esperantistoj posedas en granda mezuro. En aliaj kuntekstoj, anglalingvano povas fieri pri tio, ke li aŭ ŝi parolas tiel potencon lingvon. Inter esperantistoj, oni fakte sentas embarason, ĉagrenon, pardonpetemon, pro la nedezirata avantaĝo de tia lingva deveno; kaj eĉ ian bedaŭron, ke oni ne parolas pli malgrandan kaj do pli interesan lingvon! Al neniu iom sperta esperantisto venus la ideo, ke la islanda, aŭ la estona, aŭ la eŭska estas iel malpli interesaj aŭ malpli kapablaj lingvoj ol la angla, franca kaj germana. Per brilaj tradukoj, klera esperantisto povas konatiĝi kun almenaŭ kelkaj reprezentaj verkoj el la literaturoj de malgrandaj lingvoj – inkluzive eĉ de kelkaj

buŝaj tradicioj – kaj tiel sperti la fakton ke tiuj ĉi neniel malsuperas la vasta legatan literaturon de la tiel nomataj mondlingvoj. Pro la neegala geografia distribuo de la esperantistoj, restas multo por fari sur tiu kampo, ĉar ankoraŭ tro malmultaj estas verkoj el, ekzemple, la sudaziaj kaj afrikaj literaturoj. Sed la libromarkato en Esperanto estas tute alia ol tiu en la angla ol iu ajn alia lingvo, ĉar en ĝi, ĉiu lando prezentiĝas kiel hejmo.

Egaleco laŭ lingvolerteco

Tria tipo de malegaleco koncernas la malsamajn gradojn de lerteco inter la parolantoj de difinita lingvo. Kvankam ja ekzistas grandaj diferencoj inter la flujaj parolantoj de Esperanto kaj la komencantoj, tiuj ĉi tamen trovas multe pli sekuran hejmon ol eblas en aliaj lingvoj: unue, ĉar mankas dialektoj kaj ĝenerale pli klaras la elparolo ol ĉe la parolantoj de denaskaj lingvoj; due, ĉar ĉiu esperantisto estis mem iam komencanto, kaj oni estas (ĝenerale) pacienca kaj komprenema pri la unuaj hezitemaj paŝoj. Kaj la baza lingva kodo en Esperanto estas multe pli produktiva, ol ĝenerale en naciaj lingvoj, tiel ke oni rapide pasas al aktiva uzado – sperto revelacia por multaj lingvolernantoj, kiuj ofte sentas profundan honton pro siaj malfacilaĵoj en aliaj lingvoj. Kiel esperantisto, estas malfacile ne koleri pro la fakto, ke tiom da homoj – precipe infanoj – pasigas tiom da horoj en la studado de fremdaj lingvoj por rezultoj ege magraj, se juĝi laŭ la kapablo efike komunikadi aŭ sperti alian kulturon deinterne.

La fakto, ke reale eblas alproprigi Esperanton ĝis tiu nivelo, ke ĝi sentiĝas kiel denaska lingvo – ne nur pro teknikaj lingvostruktuaj kaŭzoj, sed ankaŭ pro la sociologio de la komunumo – ofte efikas ne nur por redoni perditan memfidon pri lingvolernado, sed eĉ por stimuli la lernadon de aliaj lingvoj, kaj por komprenigi, kio fakte estas plurlingveco. La rezultoj povas esti neatenditaj: Claude Piron, ekzemple, rakontas kiel li ekkonis per Esperanto ĉinan amikon, ekvolis lerni ties lingvon, kaj post iom da tempo trovis sin tradukisto en Unuiĝintaj Nacioj inter ne malpli ol kvar el la oficialaj lingvoj. Mi mem estas alitipa ekzemplo: miaj lingvaj scioj estas relative magraj (nur du lingvojn mi parolas flue, kaj du aliajn je malpli alta nivelo), sed la spertoj per Esperanto instigis min sukcese eklabori sur la kampo de la socilingvistiko kaj la lingvopolitiko, ĉar mi rimarkis ke miaj spertoj ne kongruas kun tre disvastiĝintaj sed eraraj prilingvaj opinioj, eĉ de profesiaj lingvistoj.

Egaleco ene de la lingvosistemo

La volo ebligi tiajn spertojn al kiel eble plej multe da homoj restas fonto de gravaj kaj pasiaj debatoj en la movado. Ĉu Esperanto estas “facila” lingvo? Ĉu ĝi estas “neŭtrala” lingvo? Kvankam skeptikuloj rigardante de ekstere starigas tiajn demandojn, ili ne povas imagi, kiel arda estas la tiutemaj diskutoj inter la esperantistoj. Kaj temas ne nur pri lingvaj principoj, sed ankaŭ pri lingva praktiko. Estas tute klare, ke la normaj gramatiko kaj leksiko de Esperanto subtile evoluas, tiel ke, ekzemple, la artikolo *la* malplioftiĝas, responde al la realaj malfacilaĵoj kiujn ĝi kreas por homoj, kiuj ne havas artikolon en sia denaska lingvo.

Tiaj evoluoj estas eĉ pli konstateblaj ĉe tiklaj temoj, kiel ekzemple la nomoj de etnoj kaj landoj. En naciaj lingvoj, nomi malproksimajn landojn kaj etnojn kreas neniujn problemojn, eĉ kiam, ekzemple, la nomoj estas pruntitaj de najbaroj ne tre amikaj. Sed en Esperanto principe neniu etno aŭ lando estas periferia: ĉiu devas senti sin hejme. Kaj tio signifas ke la nomoj evoluas en iu konstanta negocado inter nacilingvaj kutimoj kaj esperantistaj perceptoj. Ekzemple, en Esperanto la nomo de la kaŭkazia lando konata en la angla kiel *Georgia* kaj en la rusa kiel *Gruzio* estas *Kartvelio*, lando de la kartveloj, laŭ ties nomo por si mem. Kiam ekbrulis milito iom norde de Kartvelio, ekestis diskuto ĉu uzi la internacie konatan nomon *Ĉeĉenio* aŭ la nomon analogan al *Kartvelio*, faritan el la memnomo de la ĉefa popolo tie: *Nokĉio*. Inverse, sudaziaj esperantistoj esprimis preferon por la landonomo *Bharato*, laŭ la sanskrita nomo por tiu teritorio, tiel evitante la etnajn kaj religiajn nuancojn ligitajn al la radiko *hind-*.

Kiam temas ne pri etnoj kaj landoj, sed pri aferoj pli konkretaj kaj ĉiutagaj, la negocado estas ankoraŭ pli subtila. Kaj ne temas pri tio, ke ĉiu preferas vortojn pli similajn al la propra lingvo; fakte ĉe multaj observeblas tendeco precize mala. Kiam populariĝis la japandevena vorto *haŝio*, do “manĝo-bastoneto”, en la sepdekaj jaroj, ĝuste japanaj esperantistoj ekkontraŭis ĝin, argumentante ke tio estus maljusta kontraŭ la koreaj kaj ĉinaj kaj aliaj manĝobastonet-uzantaj esperantistoj. Do, temas ja pri komuna klopodo, pri kunlaboro kaj ne pri konkurenco.

Egaleco apudlingva

La kvina, lasta tipo de lingva malegaleco estas tiu, kiu akompanas la lingvon, kvankam ĝi ne estas rekte ligita al lingvouzado. Temas pri la malfavora pozicio de difinitaj etnaj grupoj, ĉu minoritatoj, ĉu malriĉaj koloniigitaj popoloj. En la lastaj dudek jaroj multe kreskis la konscio pri tiuj problemoj en la Esperanto-komunumo, ĉar Esperanto-grupoj kaj asocioj en Afriko kaj aliaj malriĉaj mondopartoj komencis ludi signifan rolon en la movado. Denove, temas pri la komenco de longdaŭra evoluo. Sed kiam oni vidas kelkajn ne tre riĉajn svedajn familojn kunskrapi sufiĉe da mono por venigi unu aŭ du tanzanianojn al Eŭropo, aŭ nederlandan paron donaci duonon de sia ŝparaĵo por subteni Esperanto-grupojn en Ĉinio, aŭ britajn esperantistojn starigi fondaĵon por venigi kubanojn al Universalaj Kongresoj, oni devas akcepti, ke okazas io tre grava kaj signifa. Temas pri ia solidareco, kiu proksimas al tiu de pli kutimaj etnoj kaj nacioj: iu forta kredo pri komuneco trans ĉiuj diferencoj.

Jen do la praktiko en la Esperanto-komunumo, evoluinta el tiu tre simple formulita principo de lingva egaleco. Egale oni povus diri, ke temas pri aro da principoj, evoluintaj el la lingva praktiko. Kaj tio starigas interesan kaj gravan lingvopolitikan demandon. Se oni proponas Esperanton kiel praktikan instrumenton por Unuiĝintaj Nacioj aŭ aliaj internaciaj organizaĵoj – kaj pri tio ni ja diskutas ĉi tie – ĉu ĝia uzado trenos kun si tiun tutan komplekson de kredoj, motivoj, principoj, unuvorte de la *kulturo* de la Esperanto-komunumo? Se jes, tio signifas ke ni proponas ion multe pli vastan ol nura lingvo; kaj eventuale, ke por la sukceso de tia enkonduko de Esperanto, necesas sufiĉe grava evoluo en la opinioj kaj konvinkoj de ĝiaj uzantoj.

Legolisto

Corsetti, Renato (red.). 1984. *Diskriminacio: Prelegaro el la 65a Universala Kongreso de Esperanto*. Rotterdam: UEA.

Duc Goninaz, Michel. 1974. *Lingvoj, gentoj kaj lingva politiko*. Liège: Someraj Universitataj Kursoj.

Etnismo. Informilo pri etnaj problemoj. Eldonas Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, Eschweiler, Germanio.

Piron, Claude. 1994. *Le défi des langues: Du gâchis au bon sens*. Paris: L’Harmattan.

Pool, Jonathan. 1987. “Thinking About Linguistic Discrimination”. *LPLP* 11/1: 3-21.

Rašić, Nikola. 1995 (indikite kiel 1994). *La Rondo Familia. Sociologiaj esploroj en Esperantio*. Pisa: Edistudio.

Tonkin, Humphrey. 1987. “Equalizing Language”. *Journal of Communication*, Spring 1979: 124-133.